ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 15 [1995/3] — Majo-Junio 1995

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono.) Elektronika poŝto: don@enkidu.dialix.oz.au

Correspondence Courses: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Somerlernejo (Terry Manley) 3
Deziras Korespondi 6
Malferma Lernado (fino de rakonto) (Elvie Rowe) 7
Alian Parabolon (Brendan Linnane) 8
Lingva Angulo (Alan Towsey) 9
Raporto de la AEA Prezidanto (Kep Enderby) 11
Dialogoj de la Dioj (tr. José F. Martín del Pozo) 13
Ĉu Aborigenoj estas Simple Pigraj? (Trevor Stele) 19
La Soroptimistoj (Ralph Harry) 20
Tradukitaj kaj Originalaj Proverboj en Esperanto (Bernard Golden) 21
Aliĝintoj al la AEA Kongreso 1995, dua listo 25
Kunsido pri la Verkado de Novelo (Ron Gates) 25

Libro:

Apenaŭ Papilioj en Bergen-Belsen (Steele/Payne) 4

Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3½-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto bonvolu kunsendi taŭgan afrankitan adresitan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Limdato por artikoloj por la julia numero: 18 junio.

SOMERLERNEJO

de Terry Manley

Partoprenis: Aŭstrio	1
Germanio	1
Pollando	1
Kvinslando	2
Norda Teritorio	1
Nova Suda Kimrio	12
Okcidenta Aŭstralio	3
Suda Aŭstralio	27
Tasmanio	1
Viktorio	4
Entute	53

Suspiro. Jen la fino. Sed menspaca kontenteco invadas min kaj mi divenas ke aliaj kunsentas. Post du semajnoj da intenseco (kaj multe pli por la organizintoj) la 11-a Aŭstralia Esperanto-Somerlernejo finiĝis per amika babilado ĉe la bankedaj tabloj, dolĉesona kantado kaj ado (eĉ ardo!) de la kisa malsano dum la disdono de atestiloj.

Entute 53 Esperantistoj partoprenis la somerlernejon. Ĉijare ne multe da eksterlandanoj (ni ne kalkulas la mallongan viziton de la Pola grupo) estis en la lernantaro.

Kion rakonti? Kompreneble mian sperton mi plej konas. Malgraŭ la fakto ke fone de la somerlernejo okazis diskutado ĉe kunvenoj por la LKKanoj, ĝi funkciis glate. Tion ni povas danki al la sperto de tri sinsekvaj somerlernejoj en la sama loko, bonaj antaŭaranĝoj kaj la fidela deĵoro de helpantoj. Bedaŭrinde ne eblis, ke eksterlanda instruisto povis alveni, sed kun la helpo de Vera Payne kaj Jennifer Bishop plenŝtopiĝis la truoj de tio. Singultoj ĉiam sintrudas, do se iu ie iam vidas la kurslibrojn de Donald preterŝvebantajn[1], kaptu tiujn kaj sendu al la adreso de ĉi tiu gazeto.

Mi ĉeestis la trianivelan kurson de Vera kie ni studis la romanon de Camus *La Fremdulo*. Traleginte kaj klariginte la libron en 9 lecionoj, je la 10a leciono ni troviĝis en profunda diskutado pretaj por pludiskuti ĝin dum jaro. Sed jen la fino, Mallonge tranĉita!

Ptm mi iris al la anstataŭiganta kurso de Jennifer Bishop pri instruado. Tie ni kunesploris instrumetodojn kaj pridiskutis instruad/lernad-spertojn. Jennifer ankaŭ pluinformis pri la kurso por infanoj en Viktoriaj lernejoj, kiu realiĝas ĉijare per la helpo de *Mazi en Gondolando.*

La aliaj kursoj de Trevor Steele, Donald Broadribb kaj June Hannay estas plensukcesaj. Mi scias tion per onidiroj kaj la bela kantado je la fino de la afero.

---

[1] Ekzempleroj intencitaj por diskutado de *Malbeno Kara* ne atingis la somerlernejon.—DH

Ekskurse mi iris al la bestoparko Cleland kaj poste al la vinberejo de gesinjoroj Bruer, kie Barbara gvidis nin ĉirkaŭ la vitoj, vidis bedojn kaj fermentejon. Ni esperas ke la familio produktos UKan vinon por '97. Aŭ almenaŭ etikedon por boteloj.

Vespere ĉiuj iom laciĝis en la unua semajno pro la varmegeco kaj ne multaj dancis kun mi.[1] Sed du-trifoje ni havis feliĉan dancorondon aŭ en la kunvenejo aŭ sur la razeno, dancante kelkajn delikatajn dancojn el Bulgario kaj Grekio. Poste sekvis prelegoj, diskutoj, respondoj. Tiam finfine dormo. Kiaj plenaj du semajnoj!

Oni diras ke kiam oni estas mortanta oni memoras ĉion de la fino ĝis la komenco de sia vivo. Eble tial mi nun retroiras tra la okazoj de la antaŭaj du semajnoj. Nebulas en mia menso la malfermo de nia somerlernejo, la komenco de la afero. Ĉu nur antaŭ du semajnoj kiam ni ariĝis en ĉambro de la Adelajda Konferenc-centro? Kiam S-ro Lucas, la ministro pri edukado en S.A. malfermis nian ĝuigan aferon? Kiam Kep respondis al la prelego de la ministro? Kiam gesinjoroj Bishop prezentis la bonan progreson de la projekto *Ekparoli*? Ne. Ne eblas. Devas esti almenaŭ monato aŭ eĉ du, ĉu ne?

Dankon al ĉiuj kaj por mi speciale al Beth Wearing pro la kvinstela servo en ŝia hejmo kaj al Makso kiu ebligis ĉion.

[1] Terry gvidis danclernajn klasojn vespere.—DH

APENAŬ PAPILIOJ EN BERGEN-BELSEN

de Trevor Steele

recenzas Vera Payne

Apenaŭ Papilioj en Bergen-Belsen de Trevor Steele. 148p. Eldonis Pro Esperanto, Vieno, 1994. $30 ĉe la AEA Libroservo.

Takso:

Formato tre plaĉa, kun grandaj presliteroj, kaj okulkapta kovrilo.

Ĉi tiu romano eldoniĝis je la 50-a liberigdatreveno de la fifamaj naziaj koncentrejoj. La apenaŭ imageblaj inferohororoj verŝajne instruis al la homaro malmulte. Refoje la brunaj kaj nigraj ĉemizoj ornamas la torsojn de la fanatikuloj; refoje kontraŭ-semitismo forte sin trudas en Germanio, Polio, Rusio; refoje la koncentrejoj stariĝas en Eŭropo. Refoje oni buĉas, eksperfortas kaj fruktigas, detruas konstruaĵojn kaj kulturaĵojn, gloras per genocido, ŝiras la kristan korpon en kies nomo oni sin krucsignas. Kaj refoje la cetera mondo rigardas kaj rezignas, dezirante ke la problemo malaperu. Kaj post iom da tempo, la problemo malaperos. Aŭ...ĉu?

Teruraj eventoj havigas al homoj daŭrajn efikaĉojn, kiujn terapio ŝajne malmulte mildigas. Koncentreja torturo, brutala seksatenco, traŭmatizo ĉiuspeca postlasas daŭrajn cikatrojn.

Du rakontoj interplektiĝas en *Papilioj*. La celo prezenti historiajn faktojn rilate al la Dua Mondmilito kaj ĝiaj postefikoj, kadre de unu semestro en la vivo de 26-jarulo, plene sukcesas.

Jen iom malpeza amaventuro de beleta junulo, Mark. (Ĉu la ampleksaj ĉarmoj de Alico ensorĉos lin? Nu, ne la kapo ĉiam impetigas.) Kaj paralele kuras la korŝira duonvivo de la homvrakoj, la "malpapilioj" kies personecstrukturo estas detruita de multaj jaroj en malliberejoj.

Mark sendube estas, plurfacete, Trevor mem. Sed kie la membiografio finiĝas ("En ĉiu ago ni celas feliĉon, kiel ajn netrafe ni celu. Mi venis al Germanio serĉante riĉigon de mia vivo.") kaj la fikcio komenciĝas, mi ne scias. Se la aŭtoro neniam deĵoris en tia institucio kiel S Nikolao, oni povas nur genufleksi antaŭ majstroverkisto.

Papilioj meritas pli da paĝoj, pli da karaktero-analizo kaj -profundigo. Tiam ĝi fariĝus grandioza verko. Kvankam en la vivo oni plejofte konas la homojn nur supraĵe, rakontistoj povas diece vidigi al ni preskaŭ la tutaĵon de la homa estaĵo. Damo Carolynne, ekzemple, kun nepre pivota rolo, estas iom komikaĉa Anglino, plata, du-dimensia. La orient-eŭropajn malpapiliojn mi trovis preskaŭ patrece priridindaj kvankam samtempe kompatindaj. "Ĉiu historio estas tragedieto: tia kia okazas milionope dum milito." Pavel, Miŝa, Tadek, Oto, Piotr—ho Dio mia, ke 12-jarulo estu tiel taksata kaj traktata de la propra patrino—ĉiu meritas sian propran historieton. Kaj la belega ĉarmulo, Jakub... Aliflanke, de la nature supraĵa vidpunkto de junulo kia la heroo, la karakteroj portretiĝas ĝuste.

Klara, bela stilo estas la kontrolmarko de Trevor Steele. Aglookule detalrimarkema, li ankaŭ orelfidele priskribas. Precipe plezurigas la diversaj akĉentoj: Pole-angla, "Van moment plis, lejdi"; Angle-germana, "Vaj nakten"; kaj la Ruse-esperantaj gemoj kiaj "...iom labuori iom tilivjidi...nje...", "...sikrjeta...rjesti momjento...".

La plaĉe acerba Ulrike vortigas la pensojn de sentemuloj dirante: "...por mi persona feliĉo apenaŭ eblus, dum la mondo estas tia dolorejo. Kaj tamen... jam dum ioma tempo mi kulpas pri revoj." Estas kliŝo diri, ke ĉio estas relativa. Mark (ĉu simbolo de "Ĉiuhom""?) tute ne komprenas kiom da malĝojo liaj pekoj povas doni. Amperfido-suferintoj prilarmos liajn pravigajn vortojn: "Jen la diferenco...inter la revo de knabo kaj la vera vivo..." Sed eksperfido palas en sensignifon kompare kun nepardonindaj suferigaj pekegoj malhumanaj. La homa estaĵo estas tiom ovoŝele vundebla. Ĉiu havas sian eltenlimon; feliĉaj estas ni kiuj neniam testiĝis.

Oni povas ĝui ĉi tiun romanon kiel simplan dramon—kaj jes, malgraŭ la temo ĝi estas ege leginda. Sed *Papilioj* ankaŭ instigas demandojn kiaj: Kie komenciĝas la kulpo pri granda krimo? Kaj: Kiom da libera volo vere troviĝas en individuo? Kaj: kiu estas la reala memo inter la miloj da personecoj ĉiumomente ŝanĝiĝantaj en ni ĉiuj?

Paĝoj 131-3 profunde kortuŝas, kaj la rakonto kresĉendas ĝis frapega klimakso. Nepre legu. ❑

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

/ CHAGTSAL A., Box no. 140, Post Office, 20-5 Ulaanbaatar, Mongolio. Deziras koni bonajn samideanojn. Komencantino en la unua Esperanto-klubo en Mongolio.

/ FUKUĈI Toŝio, Fankel leo u.1/2, emelet 19/1027 Budapest, Hungario. Japano 28jara, instruas la japanan lingvon en universitato en Hungario, deziras korespondi pri lingvoj, historio de Esperanto.

/ PEKIM Vaz, Caixa Postal 182, Belem PA, BR 66017 970 Brazilo. Fraŭlo 37jara, geologo, interesiĝas pri poŝtkartoj rilataj al arkeologiaĵoj, palacoj kaj temploj, de Nov-Zelando, Papuo-Nov-Gvineo, kaj aliaj Pacifikaj insuloj.


/ HASALA Vladisla, PO Box 34, 696 62 Strážnice, Ĉeĥio. Kuiristo 44jara, Esperantisto ekde 1967. Interesiĝas pri filatelaĵoj kaj uzitaj telefonkartoj.

/ GOLODNOV Anton, Timirjazeva 2-20, Orenburg 24, 460024 Rusio. Studento 19jara, studento en pedagogia instituto. Korespondas germane kaj angle. Deziras korespondi kun personoj ĉiuaĝaj. Interesiĝas pri vojaĝoj, literaturo, politiko, kino, historio.

/ SPEGGIORIN Bernard, 92 Avenue de Mont Redon, 13008 Marseille, Francio. Skribas ankaŭ france. 35jara. Havas fotografidiplomon. Interesiĝas pri ĵaz-improvizado. Instruas gitarludon. Deziras korespondi pri multaj temoj.

/ VINCENT Jeanine, 37 rue Gontram Labregere, 16000 Angoulème (Characante), Francio. 58jara. Lernas Esperanto ekde unu jaro.

/ SZABÓ Kristian, H-8200 Veszprém, Fecske U.17, Hungario. 24jara. Interesiĝas pri komputiltekniko, historio, sporto, turismo, lingvoj.



Heptranchias desegnis Igorj Sitnikov

MALFERMA LERNADO

de Elvie Rowe

(Fino de rakonto.)

Joĉjo estis homo kiu povis fari ion ajn. Baldaŭ li estis konata regione kiel Joĉjo Ĉionfaranto.

Orbuklojo opiniis ke ŝia patrino verŝajne pravis pri la koro de viro kaj lia stomako. Ŝi pruntis el la biblioteko kelkajn librojn pri kuirado. La legado de bele ilustrita kuirada libro estis agrabla sed efektive la laboro estis io tute aparta.

Joĉjo ne helpis. Li agis tre strange, saltante de skatoloj, supersaltante kandelingojn, tiajn aferojn farante. Orbuklojo mem devis haki la lignon kaj alporti ĝin al la kameno. Ŝi devis ekbruligi la fajron kaj tiri la akvon el la puto. Ŝi estis malrapida kaj mallerta.

Kiam Joĉjo komencis eliri nokte, portante lanternon, ŝi ne faris demandojn kaj ne aŭdis mensogojn ĉar jam ŝi estis ricevinta fingrartikajn sandviĉojn[1].

Ŝia edukado progresis per saltegoj kaj paŝegoj. Nun ŝi sciis tute pri punlaboro krom kuirado kaj belzorgado. Ŝia vortaro pligrandiĝis ĉar Joĉjo sakris ofte kaj ŝin nomaĉis.

Orbuklojo scivolis kial Joĉjo fariĝis tiel ekscentra. La kulpo devis esti ŝia. Evidente ŝi faras ion erare. Kio ĝi povas esti?

Ŝi decidis strebi plie. Ŝi konservis ĉion neta kaj senmakula. Sen konsideri la horon de lia hejmenvenado ŝi tenis preta lian manĝon ĝuste kiel li preferis ĝin.

"Vi estas tro damne preciza," diris Joĉjo.

Kompatinda Orbuklojo ne konstatis ke ŝi konkuras kontraŭ knabino kiu povas ŝnuri bovon, tordi la kolon de koko kaj trakti kastritan virŝafon pri muŝfrapo[2], la tuton antaŭ matenmanĝo.

Fionidiroj pri Joĉjo cirkulis. Oni diris ke li vizitas tro ofte Ĵilon, filino de farmisto, kiu estis tre kapabla pri nutraĵo kaj vivanta kaj morta. Unu nokton li hejmenvenis tre malfrue kaj multkontuzite. Liaj vestoj tre malsekiĝis. Sur lia kapo estis stranga, strikta, brunpapera ĉapelo, vinagrodoreganta.

Kondolencplena, la knabino helpis lin enlitiĝi kaj faris por li varman trinkon.

Li ĵetis ĝin al ŝi.

Ŝi faris por li alian.

"Ĉu vi ne povas kompreni, virino?" li hurlis. "Mi ne povas toleri rigardi vin!"

"Sed kial?" ŝi petegis. "Vidu, mi ne ŝanĝiĝis. Ankoraŭ mi estas blondulino alloga. Ankoraŭ vi estas multe pli lerta ol mi."

"Jes," diris Joĉjo. "Vi ne ŝanĝiĝis. Tio estas via eraro. Nuntempe

---

[1] Pugnobatojn.

[2] Malsano kaŭzata de la larvoj de dipteraj muŝoj sub la haŭto de ŝafo.



ne sufiĉas ke knabino estas plaĉa blondulino, eĉ kiam ŝi povas kuiri. Vi devas montri cerbon ankaŭ... Ne tiom kiel mi," li aldonis rapide, "sed vi devas esti sendependa por ke mi ne havu la respondecon pri vi. Kaj vi devas povi ŝnuri bovojn kaj tordi la kolojn de kokoj kaj trakti kastritajn virŝafojn pri muŝfrapo antaŭ ol vi kuiras mian matenmanĝon."

"Kaj purigi vian aŭton?" demandis Orbuklojo.

"Kompreneble," li diris, ĉar li volas plifortigi sian superecon.

Ŝi reiris loĝi ĉe S-ro kaj S-ino Lupo, kie ŝi ĝojis helpi pri la kuirado, la mastrumado kaj la infano. Fakte, ŝi vivis feliĉe ĉiam poste.

desegnis Igor Sitnikov

Nu, dum almenaŭ unu-du jaroj. ❑

ALIAN PARABOLON...

de Brendan Linnane

Alian parabolon li proponis al ili, dirante:
La regno de la ĉielo similas al homo kiu semis bonan semon en sia kampo; sed dum homoj dormis, lia malamiko venis kaj semis lolon meze de l' tritiko.
Kaj kiam la trunketo kreskis kaj donis frukton, tiam aperis ankaŭ la lolo.
Kaj la sklavoj de la dommastro venis, kaj diris al li: Sinjoro, ĉu vi ne semis bonan semon en via kampo? De kie do ĝi havas lolon?
Kaj li diris al ili: iu malamiko faris tion.
Kaj la sklavoj diris al li: ĉu vi do volas, ke ni iru kaj kolektu ĝin?
Sed li diris: Ne; por ke, kolektante la lolon, vi ne elradikigu ankaŭ la tritikon. Lasu al ambaŭ kreski kune ĝis la rikolto; kaj en la tempo de la rikolto mi diros al la rikoltistoj: Kolektu unue la lolon, kaj ligu ĝin en faskojn, por bruligi ĝin; sed kolektu la tritikon en mian grenejon.
Tiam forsendinte la homamasojn, li venis en la domon; kaj liaj disĉiploj venis al li, dirante: Klarigu al ni la parabolon pri la lolo de la kampo. Kaj responde li diris:
Tiu, kiu semas la bonan semon, estas Doktoro Esperanto,
kaj la kampo estas la mondo,
kaj la bonaj semoj estas la Zamenhofaj vortoj formitaj el radikoj kaj afiksoj,
kaj la lolo estas ĉiaj senbezonaj vortoj,
kaj la malamiko kiu ilin semis estas la Farisea vortaristaro, kiu ligas malfacile porteblajn pezajn ŝarĝojn de naciaj fuŝvortoj kaj metas ilin sur la ŝultrojn de novlernantoj,
kaj la rikolto estas la dissalto de l' interhomaj bariloj,
kaj la rikoltistoj estas anĝeloj de la bona lingvo.
Kiam do la lolo estos kolektita kaj bruligita per fajro, tiam efektiviĝos la bela sonĝo de l' homaro. ❑

LINGVA ANGULO

de Alan Towsey

I haven't noticed lately in my reading any major misuses of words worthy of special explanation, and no-one has sent in any problems, so I will continue with some of those expressions which make conversation a little easier and more natural.

EVERYDAY EXPRESSIONS

How long have you been learning/studying Esperanto?—Dum kiom da tempo/De kiam vi lernadas/studas Esperanton?

I've been learning since January/for a long time/for three years—Mi lernas de januaro/jam de longe/de tri jaroj.(tri jarojn).

How long were you in France?—Dum kiom da tempo vi estis en Francio? (The time is now past)

Please—Mi petas. Thanks—Dankon. Much obliged—(Vi estas) tre kompleza.

If you don't mind—Se plaĉas/ne malplaĉas al vi.

Do you mind if I smoke?—ĉu malplaĉus al vi/ĝenus vin, se mi fumus?

I don't mind—Ne ĝenus min; Ne ĝenas min; Mi nenion havas kontraŭ tio (according to circumstances)

Never mind (that)!—Ne zorgu (pri tio)! Ne gravas (= It doesn't matter)

Would you mind bringing me/Would you be good enough to bring me a glass of water?—Bonvolu/ĉu vi bonvolus/ĉu vi havus la bonecon alporti al mi glason da akvo?

Allow me ...—Permesu min ... (I beg your) pardon!—Pardonu (min)/Mi petas vian pardonon.

What does that mean in English?—Kion tio signifas angle?

What's the Esperanto for ...—Kiel oni diras en Esperanto ...

It's all the same to me/I don't care—Estas al mi indiferente.

What's the matter?—Kio estas?

What's up/What's going on?—Kio okazas?

It's all a mistake—Estas pura eraro.

What's it all about? Pri kio estas? Pri kio oni parolas?

What are you driving at?—Kion vi celas? Kion vi volas diri?

I've no idea—Mi tute ne scias.

It all depends—Tio/ĉio dependas (de la cirkonstancoj); Estas kondiĉe; Eble.

On the contrary—Male.

After all—Kiam ĉio estas konsiderita.

It doesn't matter—Ne gravas.

You're right/wrong—Vi pravas/malpravas. (See *ESK* March-April 1995.)

PICTURESQUE EXPRESSIONS

There are an enormous number of these in all languages, even Esperanto.

Sometimes they can be rendered into Esperanto by an equally picturesque expression, sometimes we just have to translate the idea behind it. Some examples follow. If any reader can suggest a more colourful but still universally understandable rendering for some of these, the editor and I would be delighted to hear from you. Let's start with

TROUBLE

You're looking for trouble!—Vi invitas problemojn/katastrofon!
Vi elvokas lupon el la arbaro!
That's too much trouble—Tio tro ĝenas/postulas tro da penego.
It's not worth the trouble—Ne valoras la penon.
I went to a lot of trouble for nothing—Mi do vane laboris/penegis.
She got into trouble—Ŝi venis en embarason/embarasiĝis/puniĝis/mallaŭdiĝis. (in another sense!) Ŝi gravediĝis (= became pregnant).
You're in serious trouble/You're dead meat!—Vi sidas profunde en la kaĉo! (Kaĉo=porridge.) Note also the following Zamenhofian expressions with kaĉo: Tro da kuiristoj kaĉon difektas—Too many cooks spoil the broth.
Kiu kaĉon kuiras, tiu ĝin mangu—As you make your bed, so you must lie on it.
That's no trouble—Tio ne ĝenas. Tio estas facila.
Please don't go to any trouble/Don't let me put you to any trouble—Bonvolu ne ĝeni vin.
I might as well have saved myself the trouble—Mi ja povintus evitigi al mi la penon. to stir up trouble—blovi en abelujon (= blow into a beehive)
a troublemaker—malpaculo, agitisto.
without any trouble—senĝene, tute facile.
without too much trouble—sen tro da klopodoj/sufiĉe facile. Everyone has his troubles—Ĉiu havas sian ŝarĝon.

MISCELLANEOUS

kill two birds with one stone—trafi du muŝojn per unu bato.
There's more than one way to skin a cat—Estas diversaj metodoj por solvi problemon.
to get away with murder—agi/fari tute laŭplaĉe; eviti la sekvojn de sia faro.
It's an uphill battle—Estas tre malfacile/preskaŭ neeble.
That's half the battle—Komenco bona, laboro duona.
ups and downs—suproj kaj suboj.
to be a tower of strength to someone—esti por iu kiel muro kaj turo.
take a stab at something—ekprovi fari ion.
kick it around—pripensi ion; konsideri la alternativojn.
That's a low blow—Tio estas ekster la reguloj.
to hit someone where it hurts—trovi ies malfortan punkton; trafi ies senteman lokon.
shoot oneself in the foot—trafi sin mem, subfosi la propran pozicion. ❑

RAPORTO DE LA AEA PREZIDANTO

de Kep Enderby

Unue, pri la Kongreso en 1997.

Sekve de kunveno kun Michael Lee, la Ministro por Turismaj Aferoj, en Kanbero, konsultado okazis ĉe la Aŭstralia Turisma Komisiono, kaj post tio ni informiĝis ke $5000 estas havebla por diskonigi nian Kongreson eksterlande. La $500 ne estas uzebla por aliaj celoj ol tio.

Estis decidite uzi la $5000 por eldoni 5000 kolorajn broŝurojn diskonigantajn la belaĵojn kaj allogaĵojn de Adelajdo, kaj ankaŭ por dungi filmiston por prepari vidbendon kiu montras Aŭstralion, inkluzive de Adelajdo, kaj ĝiajn ĉarmojn. Entute, la afero kostos iomete pli ol la havebla $5000 kaj la ekstra kosto devos esti pagita el nia propra LKK-konto.

Donald Broadribb tradukis en Esperanton la anglajn tekstojn de la broŝuroj kaj Max Wearing Esperantigos voĉe la vidbendon kiam ĝin ni havos.

Dum la venontaj du jaroj, ni havos la taskon dissendi la broŝurojn kaj la bendon tra la eksterlanda Esperanto-mondo por persvadi Esperantistojn veni al Aŭstralio por la Kongreso. Ne estos facila tasko tion fari.

Nesolvita demando

Multaj diskutoj okazis kaj daŭre okazas pri ĉu ni, por bone prepari la Kongreson, devos aŭ devus dungi profesian helpiston. Dum la diskutoj klariĝis kiom malfortaj ni, kiel movado, estas ĉi tie en Aŭstralio por prepari tian Kongreson. Ĉiuj personoj nun aktivaj en la LKK opinias ke necesas havi tian profesian helpon, kaj rezulte de tio, multaj interkonsultiĝoj jam okazis kun diversaj profesiuloj en Adelajdo. Almenaŭ unu, laŭ mi, estus tre taŭga.

Bedaŭrinde, la problemo estas ke ni efektive ne havas la financajn rimedojn por fari tion. Neniu el la profesiuloj povas garantii ke ili povus allogi sufiĉe da sponsoroj por ke ni reakiru tian elspezon! La temo tamen restas malferma.

Ne rezulte de tiu problemo, kvankam flanke al ĝi, mi devas konsciigi ke, por aliaj celoj, inter nun kaj la Kongreso mi de tempo al tempo ree serĉos kaj petos monon de nia Esperantistaro. Ni devas prezenti al la mondo Kongreson pri kiu ni povos fieri.

Ni devos havi, kiel parton de la Kongreso en 1997, Altan Protektanton kaj Honoran Komitaton. Mi unue komencis la serĉon je la plej alta nivelo. En Adelajdo mi petis al Don Dunstan konsenti esti membro de la Honora Komitato, kaj li jesis. Poste mi skribis ĝenerale al nia nuntempa Aŭstralia Ĉefministro Paul Keating, kaj al la Ministro por Fremdaj Aferoj, Senatano Gareth Evans. Pri aliaj aspektoj de nia preparo mi skribis al la Ministro por Enmigrado kaj Etnaj Aferoj, Nick Bolkus, kaj al la Ministro por Aborigenaj Aferoj, Robert Tickner. La lastaj du nur pri ĉu ili povos helpi nin rilate al nia Nacia Vespera Koncerto, kiu, en nia kazo, devos esti multkultura afero.

Kiam mi skribas ĉi tion mi ankoraŭ atendas respondon de nia Ĉefministro. Liaj helpistoj diris al mi ke la afero ankoraŭ estas konsiderata. Senatano

Evans konsentis, se ni tion deziras, ligiĝi kun la Kongreso almenaŭ nome. Li nun (10 aprilo) vojaĝas eksterlande. Nick Bolkus ankaŭ nuntempe vojaĝas eksterlande kaj revenos fine de Aprilo. Mi optimismas ke li simpatias, sed mi devos plu atendi lian revenon. Bolkus gravas en nia afero pro sia respondeco pri etnaj aferoj. Tickner, lastan Vendredon (7 aprilo), tre bonkore vizitis mian hejmon por diskuti. Li estas tre helpema kaj promesis helpi nin partoprenigi, kiel parton de nia Aŭstralia multkultura societo, membrojn de la Aborigena Komunumo.

Bedaŭrigas min diri ke rilate al ĉi tiu tasko serĉi, unu el miaj problemoj estas ke, ne surprize, la plimulto de miaj politikaj kontaktuloj estas konata kiel anoj de la Labor-Partio, kaj por havi politikan ekvilibron mi devos serĉi ankaŭ aliajn personojn kiuj ne estas tiaj. Krom la Altan Protektanton, ni bezonas cirkaŭ, mi opinias, ses aliajn membrojn en nia Honora Komitato. Unu el ili estu Prezidanto. Proponitaj nomoj tiucele estas Malcolm Frazer, Profesoro Peter Singer en Melburno, Donald Horne, kaj Pat O'Shane. Mi bonvenigos ankaŭ aliajn proponojn.

Alia Temo

En Sidnejo, fine de Aprilo, okazos grava internacia Globa Kultura Diverseca Konferenco. La Sekretario Ĝenerala de Unuiĝintaj Nacioj, D-ro Boutros Boutros-Ghali ĉeestos kaj parolos. Ĝin malfermos Paul Keating. Multaj fakaj eminentuloj prezentos prelegojn. Multaj temoj de la Konferenco rilatos al la lingva aspekto de kultura diverseco kaj do gravas por Esperanto. La temo de la Konferenco, Kultura Diverseco, konformas kun nia proponita temo por nia Kongreso en 1997, "Aŭstralio—multkultura lando en multkultura mondo: Ĉu modelo, ĉu ponto?" Mi ĉeestos kiel reprezentanto de AEA. Pri tio mi ankaŭ raportos poste.

Tre Bona Novaĵo

La *Projekto Elparoli* en Melburno progresas bone, glate kaj entuziasme. Je la 29a de marto, Max Wearing kaj mi iris al Melburno por kunveni kun Profesoro Alan Bishop kaj Jennie Bishop kaj aliaj ĉe Monash Universitato. Inter la ĉeestantoj estis Profesoro Michael Clyne kaj Judy Williams, la esplorada helpanto por la Projekto, kaj Margaret Gearon, kiu estas la LOTE (Languages Other than English = Lingvoj Aliaj ol la Angla) programfakisto kaj profesia instruanto de modernaj lingvoj ĉe Monash Universitato. Telefone partoprenis D-ro Daniel Kane.

Post la kunveno, Max kaj Jennie kaj mi veturis al Edith Vale P.S. (Primary School = elementa lernejo), unu el tri elementaj lernejoj kie Esperanto nun estas instruata laŭ la LOTE-aranĝo. Entute nun proksimume 240 studantoj en la jaroj 5 kaj 6 lernas entuziasme nian lingvon kiel la unuan paŝon de la Ekparoli projekto. Ĉi tio gravas por ni, ĉar iuj opinias ke la lernado de Esperanto en lernejoj estas malŝparo de tempo, kaj la projekto jam allogis tiajn kritikojn.

Mia respondo al la kritiko devas esti ke la projekto celas ne la instruadon de Esperanto en si mem, malgraŭ ĝia alta valoro, sed la esploradon de la temo ĉu la lernado de Esperanto helpas en la lernado de aliaj lingvoj, aparte Aziaj lingvoj.

La instruistoj en la lernejoj estas la kutimaj lernejinstruistoj, kiuj kompreneble luktas por resti unu paŝon antaŭ siaj lernantoj! Plej agrable estas vidi la entuziasmon de ĉiuj. Tio abundas. Entute estis tre agrabla kaj kuraĝiga sperto por Max kaj mi. Alan kaj Jennie meritas niajn dankegojn!

Fine

Kiel ni ĉiuj scias, la daŭra penado por kiel eble plej bone diskonigi nian Esperantan movadon estas malfacila kaj ofte malsukcesas. Mi ĝojas raporti unu sukceson.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi skribis al la tutnacia televidprogramo *11 AM* de Kanalo 7, kaj feliĉige ili respondis ke ili deziras priraportadi nian Aŭstralian Kongeson ĉijaran en julio, en Southport, aŭ ion ajn pri Esperanto kondukantan al nia Kongreso 1997. Estas tro frue nun certi pri ĝi, sed mi optimismas. ❑

DIALOGOJ DE LA DIOJ

de Lukiano (117-ĉ.180 p.k.)
Tr. José F. Martín del Pozo

(Dialogo 1: Prometeo kaj Zeŭso)

Prometeo: Liberigu min, Zeŭso; ĉar mi jam multe suferis.

Zeŭso: Ĉu vi diras, ke mi liberigu vin? Vi, kiu estas forte ŝeklita kaj kun la tuta Kaŭkazo super la kapo? Vi kies hepaton dek ses vulturoj devas ronĝi kaj ankaŭ eltiri la okulojn, pro tio, ke vi forĝis por ni tiajn bestojn la homoj? Vi, kiu ŝtelis la fajron kaj kreis la virinojn? Kaj kion diri, vi kiu trompis min en la distribuo de karnoj, oferante ostojn kaŝitajn en graso dum vi konservis por vi mem la plej bonajn partojn?

Prometeo: Ĉu mi ne jam pagis la kulpon sufiĉe? Mi kiu estas najlita sur Kaŭkazo kaj kiu nutras per la hepato ĉi tiun aglon plej damnotan inter la birdoj?

Zeŭso: Tio ne estas eĉ parteto de tio, kion vi nepre devas suferi.

Prometeo: Vi certe ne liberigos min senrekompence, ĉar mi rivelos al vi, Zeŭso, ion gravegan.

Zeŭso: Vi trompas min, Prometeo

Prometeo: Kion mi gajnus? Kaj ĉar vi ne forgesos kie estas Kaŭkazo, ne mankos al vi ĉenoj, se vi trovos min ruzanta.

Zeŭso: Antaŭe diru, kian rekompencon vi pagos, tiel gravan por mi?

Prometeo: Se mi divenos kien vi iras nun, ĉu vi akordas ke vi povos fidi

min ankaŭ kiam mi divenos la ceterajn aferojn?

Zeŭso: Kiel ne?

Prometeo: Al Tetisa, por kuniĝi kun ŝi.

Zeŭso: Vi prave divenis; kio post tio? Ĉar ŝajnas, ke vi diras veron.

Prometeo: Ne kuniĝu kun la Nereidino, Zeŭso. ĉar se ŝi gravediĝos de vi, la naskoto same faros al vi, kiel vi faris al...[1]

Zeŭso: Ĉu vi diras, ke ŝi neniigos mian potenchavon?

Prometeo: Tio ne okazu, Zeŭso! Sed kuniĝi kun ŝi minacas tion.

Zeŭso: Do, Tetiso amuziĝu sola! Kaj Hefesto liberigu vin pro ĉi tio.

(Dialogo 2: Eroso kaj Zeŭso)

Eroso: Se mi iel ofendis vin, Zeŭso, pardonu min; ĉar mi estas infano ankoraŭ neracikapabla.

Zeŭso: Vi infano, Eroso, kiu estas multe pli maljuna ol Japeto? Ĉar nek barbo kreskis al vi nek viaj haroj griziĝis, ĉu pro tio vi volas, ke oni opiniu vin suĉinfano, kvankam vi estas olda fripono?

Eroso: Kiam mi, la oldulo, maljustis kontraŭ vi, laŭ vi, por ke vi intencu ŝekli min?

Zeŭso: Vidu, malbenita, ĉu etas via ofendo: vi mokis min tiel, ke vi ne igis min ĉia: satiruso, taŭro, oro, cigno, aglo; nek mi, agrable ŝanĝita de vi, kuniĝis kun virino, sed mi devas magii kun ili kaj kaŝi min mem; ili amas taŭron aŭ cignon, sed se ili vidas min, ili mortas pro teruro.

Eroso: Kompreneble, ili ne eltenas vian rigardon, Zeŭso, ĉar ili estas mortemaj.

Zeŭso: Se tiel, kiel Branko kaj Jacinto amas Apolonon?

Eroso: Sed Dafna evitis lin spite de liaj haroj kaj lia nebarbeco. Se vi volas esti aminda, ne svingu la egidon nek portu la fulmon; kontraŭe, igu vin mem kiel eble plej agrabla, kombante ambaŭflanke la frizojn kaj reprenante ilin per diademo; portu purpuran vestaĵon, ligigu orajn sandalojn, marŝu ritme de flutoj kaj timpanoj, kaj vi vidos, ke sekvos vin pli ol la Menadoj de Dionizo.

Zeŭso: Foriru! Mi ne volus esti aminda se mi iĝus tia.

Eroso: Do, ne volu ami, Zeŭso; tio estas facila.

Zeŭso: Ne, mi volas ami, kaj atingi ilin pli senpene; mi liberigos vin kontraŭ tio.

Dialogo 3: Zeŭso kaj Hermeso)

Zeŭs: Ĉu vi konas la belan filinon de Inaŭo, Hermeso?

Hermeso: Jes—vi parolas pri Ioan'?.

Zeŭso: Ŝi ne plu estas knabino, sed bovidino.

Hermeso: Tio estas stranga; kiamaniere ŝi ŝanĝiĝis?

---

[1] Aludo al mito en kiu Zeŭso kastris sian patron.

SUMMER SCHOOL

by Max Wearing

One step forward (and one back)

The Australian Esperanto Summer School took an important step forward in January 1995 by proving it could attract enough students from (all) Australian stales (and some overseas countries) even in a year when the Australian Esperanto Congress was yet to be held in another city. It is hoped that from now on the Australian Esperanto movement (like its US counterpart) can sustain annually (instead of biennially) both a national Congress and a national Summer School at different times and in different places.

In 1995 the Summer School also took a backward step, however, (despite having three of Australia's best Esperanto teachers —Vera Payne, Trevor Steele and Donald Broadribb), by failing to provide a highly qualified overseas teacher (like Dr So in 1993 and Dr Melnikov in 1994). Atilio Orellana Rojas would certainly not have withdrawn from the 1995 school if we had been able to guarantee him a fee and travelling expenses comparable with those paid (for example) by the annual Esperanto Summer School in the State University of San Francisco, which in July 1995 will offer to a similar number of students four class levels taught by three overseas teachers and one from the US.

A step back (and one forward)

In 1993 and 1994 the Summer School in Adelaide attracted either prime-time television news reportage or a large photograph and article in Adelaide's major daily newspaper, *The Advertiser*. That media coverage resulted from interest in the overseas visitors. No such coverage appeared in 1995. Even the official opening in the Adelaide Convention Centre failed to capture media attention.

We can regard as a step forward, however, the School's being opened by the South Australian Minister of Education, Hon Rob Lucas. If (as we hope) the *EKPAROLI* project of Monash is extended in the future to include some South Australian schools, there can be no doubt that its acceptance will be firmly based on the Minister's impressions of the excellent presentation of *EKPAROLI* by Professor and Mrs Bishop during that opening ceremony.[1]

The firm base

The solid ground upon which every forward step is taken by the Australian Esperanto Summer School is the quality and dedication of our best teachers, the continued participation of our best Esperantists, and the willing work of people like Margaret Furness, Rochelle Jacquier, Terry Manley, Bob and Audrey Felby, Colin Giles, Virginia Lampe, Brendan Linnane, and June Hannay.[2]

---

[1] An audio tape of the Opening Ceremony of the 11th Australian Esperanto Summer School can be obtained by sending $11.00 to Instant Conference Taping, P0 Box 438, Plympton SA 5038. Ph (08) 357 4077, fax (08) 293 8717.

[2] A copy of the complete list of workers and participants in the 11th Australian Esperanto Summer School can be obtained by writing to the Editor of *La Lumilo*, Bob Felby, 6

Twice in the past, the success of a Summer School in Adelaide was endangered by the withdrawal of an expected teacher. On those occasions Shirley Gradussov capably filled the gap. For the 1995 School it was Vera Payne who took Atilio's level I class (in addition to her own two) and Jennifer Bishop who led Atilio's afternoon Teaching Methods elective. We are very fortunate in having such capable and dedicated professionals. The decision to run the Summer School twice as often as in the past means that we shall have to use our local teachers even more, at the same time trying to resume the tradition of presenting one outstanding teacher from overseas.

Hopes and challenges for 1996

For the 1996 Summer School we hope to have the services of Katalin Smildeliusz, a Hungarian Esperanto lecturer whose qualifications are of particular relevance to us in Australia at this lime: Firstly, she has written a PhD thesis on the propaedeutic value of Esperanto for Hungarian learners of the Italian language and secondly (like Atilio Orellana Rojas) she is one of the few people with internationally recognized qualifications for training Cseh (direct) method Esperanto teachers

One big challenge for the January 1996 School is the fact that it is timed to follow immediately the 1996 Australian and New Zealand Esperanto Congress in Auckland. Another is that we need to attract more beginners and more potential Esperanto teachers for the future. Our ambitious plan to draw the Australian public's attention to Esperanto by mounting the World Esperanto Congress here in 1997 must also include the recruiting of a new body of teachers to work in Australian school systems.

COMPUTERIZED TRANSLATION: THE WAY OF THE FUTURE?

by Donald Broadribb

Have you ever wondered that in the Star Trek series everyone speaks English, except for the Klingons who appear to speak the only other language known in our galaxy? The use of only one language in the space ship itself is easy to justify. On a galaxy class exploration and research ship, which is strangely better armed than virtually any other starship in the universe, the use of a single language is inevitable. After all, so much depends on the crew understanding and carrying out split-second orders from the captain. But all the other planets in the galaxy? If you watch the series closely to discover the method used for universal communication, you eventually learn that the ship has a universal translating machine, one capable of translating and simultaneously broadcasting messages, or even long conversations, in every known and unknown language in the galaxy. Ah for the 22nd century!

Dorset St, Semaphore Park 5019; send $1.00 to cover postage and photocopying.

Is such a machine possible, a machine, presumably computerized, capable of translating accurately and with all the necessary nuances everything said in another language? Well, actually the current aim is somewhat simpler: to do any sort of translation at all.

Many people think such computer wonders are already in existence. I have come across many "computer illiterate" persons—people who have no knowledge or experience of using computers—who are under the pleasant illusion that when I press the appropriate key on my computer's keyboard to write in Russian, my computer not only prints with Russian letters but translates into Russian whatever I type in in English. Similarly they suppose that when I press the keys, or move the computer mouse, to tell the computer to use the Spanish keyboard, or the French, the computer allows me to type in English and itself furnishes me with the equivalent text in Spanish or French. Or classical Greek. (How else could I have translated Plato's *Republic* from Greek into Esperanto?),

Besides, stores and mail order catalogues advertize translation machines. I have one such ad at hand from Innovations: "Speak 15 languages instantly! New world translator and personal computer. Great news—now you can do a deal in no less than fifteen European and Asian languages. ... Special Features: 10,500 words per language. Size—only 14x10x1 cm." It's called the Wordmate Computer, and sells for $179. (An extraordinary bargain, considering that you have to pay rather more than $2000 to buy an Apple Macintosh computer with "world script" capabilities, and a rather expensive program named Nisus Writer.)

Such a "word translator" as Innovations is advertizing is actually a sort of computerized dictionary. It takes a word you type in English and tells you the corresponding word in one of the selected languages. And it has also a couple of hundred commonly used phrases. Whether anyone will understand is another matter. Everyone who studies a foreign language discovers to their dismay that a "word for word" dictionary approach gets you nowhere fast.

On the other hand, such a machine could be quite useful if you already speak a foreign language and need to find a word you don't know.

Serious attempts to make a translating program which a computer can use have been under way for well over thirty years. In recent years a Dutch firm spent a large sum of money trying to make a translating system (known as the Distributed Language Translation system, DLT) that would handle translations into and from Esperanto. This proved unfeasible, the project has been dropped.

Why is it so hard? The problem is that translating into another language requires not just a knowledge of a dictionary. A fully operational translating didictionary is theoretically manageable. For English the computerized dictionary would have to include around two hundred thousand words just for simplified texts to be translated. That is because from the computer's point of view am/is/are/art/was/were/be are seven different words. And sew, sewn, sewing are three dictionary words, as are mean, meant, meaning, and write/wrote/written. We have no computer at present that can handle and manipulate such a large number of words "instantaneously", but it is theoretically possible. If not "instan-

taneously" then with only a fraction of a second delay.

Every language, even Esperanto, has a fairly intricate grammar. Human beings have the remarkable ability to remember and use the basic grammatical structure of a language, and this is as true of illiterate people as of the highly educated. The computer, however, has to be taught for every word just how it may be used. For example, in English, to table, to book, to chair, to bed, to radio, to phone are all acceptable, but "to footstool", "to television", "to cupboard", and "to computer" are not acceptable English. Unfortunately, every noun in the language has to be marked for the computer as to whether or not it can be used as a verb. But in Esperanto? Yes, there too. In Esperanto we can say "televido, mi televidas"; "skribo, mi skribas"; "telefono, mi telefonas". But we are not allowed to say "mi litas", "mi tablas", "mi libras", "mi seĝas" etc. An Esperanto speaker would comment: "you can't say those words because they don't mean anything". But then why are the equivalent words in English allowed? In any event, the point is made, that for every word or word-root the computer translating program would have to be told whether or not it can be used as both a noun and a verb, and if two languages differ, how to make appropriate alterations.

Is it possible in the future? Probably. The near future or far future? Who knows. No sensible person would care to forecast such developments.

What was the reason that the DLT project, mentioned above, used Esperanto as an intermediate step in computer translating, such as English to Esperanto, then Esperanto to French, or Chinese, or whichever? The reason is that, theoretically, a knowledge of far fewer word roots (approximately 15 000 in Esperanto, upwards of a hundred thousand in English) would be needed. It's far simpler to translate *from* English than to translate *into* English. When a text is translated into Esperanto the text's grammatical structure is modified and regularized. Consequently a far smaller number of word forms which are forbidden or accepted need be put into the computer's program. For example, a word which came under fire in the ABC's "Media Watch" recently: the confusion between "lend" and "loan". Grammatically, they are verb and noun respectively. When translating into English the computer has to know which is a verb form and which a noun form, and be able to judge *by context* whether a noun or verb is required. In Esperanto there is only one root word, "prunt-", although the computer still has to know whether a verb or noun is required. (Also, this particular word has its own oddity in Esperanto. I'll leave it to our Esperanto speaking readers to point out what that oddity is).

However, for now, in any event, learning other languages is still the only way to communicate around the world.

If you wish to know more about Esperanto, or to examine the possibility of learning Esperanto through a correspondence course, we suggest you contact:

John Moore
7 Pelican Place
Emu Park Qld 4702.

Zeŭso: Ĵaluzante, Hera metamorfozis ŝin. Sed ŝi komplote pensis ion alian eĉ pli teruran por la malfeliĉa; ŝi metis paŝtiston multokulan, Arguso laŭnome, kiu paŝtas la bovidinon kaj ne dormas.

Hermeso: Kion ni faru?

Zeŭso: Flugu suben al Nemeo (kie Arguso paŝtas), mortigu lin kaj konduku Ioan trans la maro al Egiptio kaj faru ŝin Izisa; ekde nun ŝi estu tiea diino, levu la Nilon, sendu la ventojn kaj protektu la navigantojn.

Dialogo 4: Zeŭso kaj Ganimedo)

Zeŭso: Nu, Ganimedo (ĉar ni alvenis kien ni devis), kisu min jam, por ke vi sciu, ke mi jam ne havas bekon kurban nek ungegojn akrajn, kia mi aperis al vi, kiam mi ŝajnis birdo.

Ganimedo: Homo, ĉu vi ne ĵus estis aglo kaj, flugante suben, forprenis min disde la brutaro? Kiel defalis tiuj flugiloj kaj vi jam aperas alia?

Zeŭso: Vi ne vidas homon, knabeto, nek aglon, sed mi estas la reĝo de la dioj, kiu ŝanĝis min mem porokaze.

Ganimedo: Kion vi diras? ĉu vi estas Pan'? Se tiel, kiel vi ne havas ŝalmon nek kornojn, nek vilajn krurojn?

Zeŭso: Ĉu vi kredas, ke nur tiu dio ekzistas?

Ganimedo: Jes; ni oferas al li nekastritan kapron, kiun ni portas al la kavo kie li staras; vi ŝajnas al mi iu sklavovendisto.

Zeŭso: Diru al mi, ĉu vi ne aŭdis la nomon Zeŭso, nek vidis en la Gargaro la altaron de la dio kiu okazigas pluvon kaj fulmojn?

Ganimedo: Amiko, ĉu vi diras, ke vi estas kiu antaŭnelonge faligis sur nin tiun hajlegon? Tiu, kiu laŭdire loĝas en la altaĵoj? Tiu, kiu faras bruegon? Tiu, al kiu mia patro oferis ŝafon? Do, kiel mi maljustis, ke vi forrabis min? Eble la lupoj atakos miajn ŝafojn solajn kaj dispecigos ilin.

Zeŭso: Ĉu pri ŝafoj ankoraŭ okupiĝas vi, kiu jam estas nemortema kaj ekde nun loĝos kun ni?

Ganimedo: Kion vi diras? Ĉu vi ne kondukos min suben al Ida Monto hodiaŭ mem?

Zeŭso: Neniel; mi vane iĝintus aglo anstataŭ dio.

Ganimedo: Mia patro serĉos min kaj furioziĝos kiam li ne trovos min, kaj mi ricevos skurĝbatojn pro tio, ke mi forlasis la ŝafaron.

Zeŭso: Kiel li vidos vin?

Ganimedo: Lasu min; ĉar mi jam nostalgias lin. Se vi kondukos min al li, mi promesas, ke mi oferos al vi alian ŝafon kiel mian elaĉeton. Ni havas ŝafon trijaran, grandan, kiu kondukos la aliajn paŝtiĝi.

Zeŭso: Kiel simpla estas la knabo, kiel naiva, kiel infaneca ankoraŭ! Ganimedo, adiaŭu kaj forgesu ĉi-ĉion, la ŝafaron kaj Idan Monton kaj vi de ĉi tie faros multan bonon kaj al via patro kaj al via patrujo (ĉar vi jam estas ĉielloĝanto), kaj anstataŭ fromaĝon

kaj lakton vi manĝos ambrozion kaj trinkos nektaron. Vi mem verŝos tion por ni la ceteraj; plej grave, vi ne plu estas homo: vi iĝos nemortema, kaj mi igos vian astron bruli belega; unuvorte, vi estos feliĉa.

Ganimedo: Se mi volos ludi, kiu ludos kun mi? Ĉar en Ida Monto ni estis multaj samaĝaj.

Zeŭso: Vi havos ĉi tie kiel kunludanton ĉi tiun Eroson kaj multegajn ludkubojn. Konfidu kaj estu kontenta kaj nostalgiu nenion surteran.

Ganimedo: Nu, kiel mi povos utili al vi? Ĉu ankaŭ ĉi tie bezoniĝas paŝtisto?

Zeŭso: Ne, vi verŝos vinon kaj okupiĝos pri la nektaro kaj prizorgos la bankedon.

Ganimedo: Tio ne malfacilas; mi jam scias kiel oni devas verŝi lakton kaj oferti la bovlon.

Zeŭso Ej! Denove li memoras lakton kaj pensas, ke li servos al homoj; ĉi tio estas la ĉielo kaj, kiel mi diris, ni trinkas nektaron.

Ganimedo: Ĉu ĝi pli bongustas ol lakto?

Zeŭso: Vi scios post malmulte da tempo, kaj post gustumi ĝin, vi ne plu nostalgios lakton.

Ganimedo: Kie mi enlitiĝos nokte? Ĉu kun Eroso, mia samaĝano?

Zeŭso: Ne, por tio mi ŝtelis vin, ke ni kundormu.

Ganimedo: Ĉar vi ne povas sola, kaj estus pli agrable dormi kun mi?

Zeŭso: Jes, ĉar vi estas tia, Ganimedo, tiel bela.

Ganimedo: Kiel mia beleco utilos al vi por dormi?

Zeŭso: Ĝi havas iun dolĉan ĉarmon kiu faras ĝin pli milda.

Ganimedo: Tamen, mia patro ĉagreniĝis kiam mi dormis kun li kaj detale priskribis matene, kiel mi interrompis lian dormon turniĝante, piedfrapante kaj kriante dorme. Do li plejofte sendis min dormi kun la patrino. Se estis pro tio ke vi rabis min, kiel vi diras, jam estas tempo, ke vi denove resendu min al la tero, aŭ vi maldormos; ĉar mi ade turniĝos kaj ĝenos vin.

Zeŭso: Vi faros la plej agrablan, se mi maldormos kun vi, kisante kaj ĉirkaŭbrakante vin.

Ganimedo: Vi scios; ĉar mi dormos dum vi kisos min.

Zeŭso: Tiam ni scios, kio farendas. Nun, konduku lin for, Hermeso, kaj post kiam li trinkos el la nemorteco, konduku lin, por ke li verŝu; sed antaŭe instruu lin, kiel li devas oferti la pokalon.

(Dialogo 5: Hera kaj Zeŭso)

Hera: Ekde kiam vi, Zeŭso, forprenis ĉi tiun Frigian knabon el Ida monto kaj alportis ĉi tien, vi malpli atentas min.

Zeŭso: Hera, ĉu vi ĵaluzos ankaŭ pri li, kiu estas tiel simpla kaj nesuferiga? Mi supozis, ke vi kruelas nur kontraŭ la virinoj kiuj kuniĝas kun mi.

Hera: Kion vi faras nek bonas nek decas al vi mem, kiu, reĝo de ĉiuj

dioj, forlasinte min, vian laŭleĝan edzinon, descendas teren adultocele, iĝinte oro aŭ satiruso aŭ taŭro. Tamen, tiuj virinoj viaj restas sur la tero, sed forpreninte ĉi tiun Idan knabon vi sorflugis, vi plej nobla el la dioj, kaj li eĉ loĝas kun ni, antipatia, super mi, por verŝi la vinon laŭpretekste. Ĉu vi tiom bezonas verŝistojn? Ĉu Heba aŭ Hefesto forrezignis plu servi? Vi neniam prenas de li la pokalon sen kisi lin dum ĉiuj rigardas, kaj la kiso pli dolĉas al vi ol la nektaro, kaj pro tio vi petas trinkon al li, eĉ kiam vi ne soifas; foje, nur gustuminte, vi donis la pokalon al li, kaj kiam li trinkis, vi prenis ĝin kaj trinkis tion, kio restis tie, el kie la knabo trinkis kaj tie metas la lipojn, por samtempe trinki kaj kisi. Antaŭnelonge, vi, reĝo kaj patro de ĉiuj, formetinte la egidon kaj la fulmon, sidis ludante per ludkuboj kun li, malgraŭ via longa barbo. Mi vidis ĉi ĉion, do ne kredu, ke mi ne scias.

Zeŭso: Kaj kiel malbonus, Hera, kisi tiel belan knabon dum mi trinkas, kaj ĝui kaj la kison kaj la nektaron? Se mi permesus al li, ke li kisu vin eĉ nur unufoje, vi neniam riproĉus min pro tio, ke mi opinias la kison preferinda.

Hera: Tiuj estas vortoj de pederastiulo. Mi neniam frenezigu kaj proksimigu la lipojn al tiu mola Frigiano tiel virineca!

Zeŭso: Ne insultu, vi la plej nobla, miajn knabetojn. Ĉar tiu virineculo, tiu barbaro, tiu molulo, estas al mi pli dolĉa kaj pli dezirinda ol... mi ne volas diri, por ne furiozigi vin eĉ pli.

Hera: Koncerne min, vi edzigu lin; sed memoru kiel vi mistraktas min kvazaŭ ebria, pro tiu vinoverŝisto.

Zeŭso: Nu, via filo Hefesto devus verŝi por ni, lamante, veninte el la forĝejo kovrite per skorio, ĵus forlasinte la tenajlon; kaj ni devus preni la pokalon el liaj fingroj kaj altiri lin al ni kaj kisi lin, kiun eĉ vi, lia patrino, ne kisus laŭplaŭe, kun lia vizaĝo nigrigita de fulgo. Tio estus pli agrabla, ĉu ne? Tia vinoverŝisto pli decus por la bankedo de la dio? Kaj Ganimedon vi volas resendigi al Ida monto—ĉar li estas pura, kaj rozfingra, kaj lerte ofertas la pokalon, kaj, kio plej multe ĝenas vin, ĉar liaj kisoj pli dolĉas ol nektaro.

Hera: Zeŭso, nun lamas Hefesto kaj liaj fingroj ne estas dignaj je via pokalo kaj li plenas de fulgo, kaj naŭzas al vi, kiam vi vidas lin; sed nun Ida monto naskis ĉi tiun belan longharan knabon; antaŭe vi ne vidis tion, nek la skorio nek la forĝejo malhelpis, ke vi trinku el liaj manoj.

Zeŭso: Vi ĉagrenas vin mem, Hera, kaj via ĵaluzo pliigas mian amon, se vi ĉagreniĝas kiam vi ricevas la pokalon el la mano de tiu bela knabo, do via filo verŝu por vi. Ganimedo donu la pokalon nur al mi, kaj ĉiufoje kisu min dufoje, kaj kiam vi ofertas ĝin plena, kaj poste, kiam vi ricevos ĝin de mi... Sed, kial tio? Ĉu vi

ploras? Ne timu; ĉar plendos, kiu volos ĉagreni vin.

(Dialogo 6: Hera kaj Zeŭso)

Hera: Ho, Zeŭso, kia vi konsideras tiun Iksionon?

Zeŭso: Homo honesta, Hera, kaj festenema; li ne akompanus nin, se li estus nedigna je la festeno.

Hera: Sed li ja estas nedigna, ĉar li estas malrespekta; do ke li ne plu akompanu nin.

Zeŭso: Nu, kiel li malrespektis? Mi opinias, ke ankaŭ mi devas scii.

Hera: Kiel, se ne...? Tamen, mi hontas diri, tiom li aŭdacis.

Zeŭso: Des pli vi devus diri, se li intencis tiajn hontindaĵojn. Ĉu li provis delogi iun diinon? Mi supozas, ke tia estas la afero, pri kiu vi timas paroli.

Hera: Min mem, ne iun alian, Zeŭso, jam delonge. Komence, mi ne sciis, kial li fikse rigardas min; li sopiris kaj ploris, kaj se iam, trinkinte, mi redonis al Ganimedo la pokalon, li petis trinki el la sama pokalo, li prenis kaj kisis ĝin, metis ĝin antaŭ siaj okuloj kaj denove rigardis min; mi tiam sciis, ke li enamiĝis. Multe da tempo mi hontis rakonti al vi tion, kaj kredis, ke tiu homo finos sian frenezon. Sed kiam li kuraĝis fari al mi proponojn, mi venis informi vin, lasinte lin krianta kaj ĵetanta sin al miaj piedoj, kovrante miajn orelojn por ne aŭskulti lin petegi tiujn senhontaĵojn. Vi mem decidu, kiel vi punos tiun viron.

Zeŭso: Tre bone, la malbenita! Ĉu kontraŭ mi mem li aŭdacas? Ĉu eĉ ĝis la lito de Hera? Ĉu li tiom ebriiĝis de nektaro? Sed ni kulpas pri tiuj agoj, kaj nia pretermezura homamo, kiuj faris lin nia kuntrinkanto. Pardoneblas, se trinkante same kiel ni kaj vidante ĉielajn belaĵojn kaj kion ili neniam vidus surtere, ili dezirus ĝui ilin, venkite de amo. Ĉar amo estas io violenta kaj ne nur regas la homojn, sed foje eĉ nin mem.

Hera: Li certe estas via mastro kaj kondukas kaj trenas vin de la nazo, laŭdire, kaj vi sekvas lin kien ajn li irigas vin, kaj vi facile iĝas kia ajn li ordonas, kaj vi tute estas sklavo kaj amuzilo de la amo. Kaj nun, mi scias kial vi pardonos Iksionon, ĉar vi mem iam adultis kun lia virino, kiu naskis al vi Piritoon.

Zeŭso: Do, vi memoras pri tiuj, eĉ kvankam mi nur iom ludetis kiam mi descendis teren? Tamen, ĉu vi scias, kion mi opinias pri Iksiono? Nek puni lin, nek elpeli lin el nia bankedo; ĉar tio estas malĝentila. Ĉar li amas, kaj kiel vi diris li ploras kaj suferas nedireble...

Hera: Kion, Zeŭso? Mi timas, ke ankaŭ vi diros insulton.

Zeŭso: Neniel; sed ni faru modlaĵon el nuboj similan al vi mem; kiam la bankedo finiĝos kaj li supozeble maldormos, pro la amo, ni kuŝigos ŝin apud li. Tiel eble li ne plu ĉagreniĝos, pensante ke li jam atingis sian deziraĵon. *(daŭrigota)*

ĈU ABORIGENOJ ESTAS SIMPLE PIGRAJ?

de Trevor Steele

El la vidpunkto de vizitanto la komunumetoj de Arnhem-Lando estas tre malpuraj. Multaj naivaj eksteruloj—mi ne estis escepto—imagas ke, se ili purigas kaj ordigas la lernejan ĉambron aŭ la porvirinan "rifuĝejon", la lokaj homoj fine komprenos, ke eblas havi pli agrablan ĉirkaŭaĵon, kaj mem ĉesos ĵeti siajn rubaĵojn sur la plankon. Kompreneble la aborigenoj scias, ke oni volas "instrui" ilin tiel: ili restas surdaj al la Evangelio pri Pureco.

Ĉio estas relativa: kio ŝajnas al mi malpura, eble tute ne vekas impreson ĉe aborigeno—kaj inverse. Povas esti, ke homoj el nia eŭropa civilizacio estas obsedataj de higieno kaj ekstera bonordo: eble ni hontinde neglektas ordigi nian psiĥan mondon. Eble la sola legitima demando estas, ĉu la aborigenoj mem estas kontentaj pri la stato de siaj loĝlokoj.

Ofte aŭdata klarigo: nomadoj ofte ŝanĝas la tranoktejon, kaj iliaj forĵetaĵoj rapide putras sur la tero. Sed se tiuj nomadoj loĝas en unu loko, kaj ricevas manĝaĵon en metalo, plasto, kartono kaj papero, baldaŭ estiĝas loko nekonforma al niaj estetikaj juĝoj—kaj foje danĝera al la sanstato.

Sed ni revenu al la titola demando: ĉu aborigenoj estas pigraj? Sendube estas pigruloj inter ili, samkiel en ĉiu homgrupo. Tio tamen ne estas serioza respondo. Ni bildigu lastan fojon domon (aŭ eble kabanon) de aborigenoj meze en tereno, kiu pensigas pri vilaĝa rubejo. De tempo al tempo iu (kutime virino) ja provas ordigi aŭ almenaŭ forraki je kvin metroj la forĵetaĵojn. Sed, se loĝas 15-30 homoj tie, kiel eĉ rezoluta unuopulo trudu sian ordemon? La opinio de la kunuloj ege gravas en la vivo de aborigeno.

Ni plilarĝigu la bildon. La homoj de Arnhem-Lando vivas tiel malproksime de la maŝinaro de la nacia ekonomia sistemo, ke ege malmultaj el ili havas konvencian laborlokon. Provoj enkonduki diversajn entreprenojn sur aborigema teritorio kutime fiaskas pro mankanta intereso pri regula laboro.

Nomado nek semas nek rikoltas. Li estas laŭvorte—mi uzas la terminon sen morala kromnuanco—oportunisto, li prenas kie, kiam, kiom, kaj kiel li povas. Krome, lia vivo povas esti tre peniga: ĉasadi kanguruojn tuttage kaj kapti nenion instruas al li ŝpari sian energion. Nu, iam li trovis ĉion necesan en la naturo, sed nun li vidas, ke dank' al la interveno de la senfine riĉaj blankuloj eblas senpene ricevi eĉ multe pli ol antaŭe. Estus stulte ne preni. Kaj kial labori, se oni povas ricevi sen laboro? Jes, foje oni ĉasas bubalon aŭ kanguruon, sed uzante kamionon kaj fusilon. Kaj se ĉaso estas senrezulta, ne gravas, ĉiun duan semajnon venas kamiono kun faruno, sukero, teo, kaj aliaj bonaĵoj.

Tiun sintenon oni nomas "kargo-kulto". Ĉu ĝi estas neevitebla etapo de la transiro de mortanta kulturo al nova vivipova, aŭ ĉu ĝi obstaklas ĉian bonan evoluon, ni ankoraŭ ne povas juĝi. Sed certe ĝi kutimigas la aborigenojn agi tiel, ke ili ŝajnas al eksterulo pigraj. ❑

LA SOROPTIMISTOJ

de Ralph Harry


La 27-an de marto Ralph Harry parolis al Soroptimist International of Manly (Soroptimista Internacio de Manlio) pri la temo: *Aventuro en Esperantujo—Hiroŝimo kaj Paco.* Li rakontis spertojn siajn en la klopodado por paco, kaj substrekis la rolon de Esperanto por internacia interkompreno.

Li menciis ke en 1978, kiel Vicprezidanto de la Ĝenerala Asembleo de UN, li bonvenigis delegitaron de la urbo Hiroŝimo, kiu petis la Ĝeneralan Asembleon efektivigi la sonĝojn de la homaro por la malarmigo kaj paco. En 1994, kun postkongresa ekskurso li vizitis la Esperanto-societon de Hiroŝimo. Nun, responde al invito de Stephen Kelen, antaŭa Prezidanto de la sidneja PEN-Centro (klubo de verkistoj), kiu vizitis Hiroŝimon plurfoje en 1946, li tradukas lian libron: *Mi memoras Hiroŝimon.* Espereble ĝi aperos antaŭ la 6-a de aŭgusto, 1995, kiu estos la 50-a datreveno de la faligo de la unua atombombo sur Hiroŝimon.

La Soroptimistoj estas membroj de multlanda asocio en kiu virinoj, de diversaj profesioj kaj okupoj, kunvenas por aŭskulti paroladojn kaj labori por la socio. Iliaj celoj estas "Servado kaj partoprenado"; ilia moto estas: "Rigardante pli malproksimen"; kaj en ĉiu kunveno ili deklamas la sekvantan promeson:

> Mi promesas lojalecon al Soroptimismo
> kaj al la idealoj kiujn ĝi reprezentas.
>
> *La sincereco de Amikeco*
> *La ĝojo de atingado*
> *La digno de Servado*
> *La honesteco de Profesioj*
> *La amo al sia Lando*
>
> Mi kontribuos miajn plej grandajn klopodojn por antaŭenigi, subteni kaj defendi ĉi tiujn idealojn por ĉio kio estas la plej bona kaj la plej nobla en la homaro.

La urbestrino de Manlio, kiu ankaŭ partoprenis, esprimis interesiĝon pri la Esperanto-klubo kiu aktivas en ŝia urbo. ❑



desegnis Igorj Sitnikov

TRADUKITAJ KAJ ORIGINALAJ PROVERBOJ EN ESPERANTO

de Bernard Golden

Enkonkudo:

Proverbo estas sperto, proverbo estas averto

La 18-an de aprilo 1994 mi prezentis referaĵon titolitan "Kreado kaj uzado de originalaj proverboj en Esperanto" ĉe kunveno de la ERo-Rondo sub aŭspicio de la Esperanta PEN-centro en Budapeŝto. Mi demonstris, ke esperantistoj en la pasinteco kaj ankaŭ nuntempe uzas proverbojn jam tradukitajn el diversaj etnolingvoj kaj ankaŭ kreas originalajn proverbojn. Same kiel tradiciaj proverboj ĉerpitaj plejparte el *Proverbaro Esperanta*,[1] la novaj gemoj de saĝo servas por reliefigi observojn pri la mondo kaj homoj, konsili kontraŭ malbonaĵoj kaj doni ekzemplon de ĝusta konduto. Ĉi-specaj frazeologiaj esprimoj plej ofte servas por pipri kaj spici beletrajn verkojn, sed ili ja havas konvenan lokon ankaŭ en alispecaj tekstoj. En tiu ĉi artikolo mi faros analizon de la rolo de proverboj en la kulturo de membroj de la Esperanta lingvokomunumo kaj dokumentos miajn komentojn per pluraj citaĵoj el publikigitaj verkoj. Ĉar plurfoje mi legis aŭ aŭdis negativajn opiniojn pri la funkcio kaj valoro de proverboj en la hodiaŭa vivo, mi pensas, ke estos utile mencii kelkajn atestaĵojn de la aktuala popularеco de proverboj.

Lastatempe altiris mian atenton valoraj kolektaĵoj da proverboj publikigitaj en Hungario. En 1993 aperis la dua represita eldono de 770-paĝa libro kun pli ol 25 000 hungaraj proverboj; ĝi estis publikigita la unuan fojon antaŭ preskaŭ cent jaroj en 1896! Ankaŭ en 1993 estis eldonita la unua volumo de kolektaĵo da 20 000 proverboj el la tuta mondo, tradukitaj en la anglan kaj hungaran lingvojn. Por kleruloj aperis utila kompilaĵo de kompara materialo, konsistanta el pli ol 600 proverboj kaj frazeologiaj esprimoj kun ekvivalentoj en la hungara, estona, germana, angla, finna kaj latina lingvoj. Estas ankaŭ kelkaj tradukoj en la franca, itala kaj helena, kaj en aparta sekcio troviĝas proverboj en du finnugraj lingvoj de Azio, la ĉeremisa kaj la zirja.

Por esperantistoj la plej utilaj konsultlibroj estas *Proverbaro Esperanta* kun 2630 registraĵoj, kaj la hungara-Esperanta *Domfabriko*[2], kiu enhavas 6000 frazeologiajn esprimojn. Ekzistas ankaŭ *Proverboj de Marko Zamenhof kaj Lazaro Zamehof*[3] plena kolekto de la zamenhofa proverbaro en Esperanto kaj la franca, germana, pola kaj rusa lingvoj. Kaj oni ne forgesu la malnovan

---

[1] L.L. Zamenhof. *Proverbaro Esperanta.* La Laguna: J. Régulo; 1961. 167 pĝ.

[2] Ada Csiszár kaj Kálman Kolocsay. *Domfabriko. 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-Esperantaj.* Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio; 1975. 188 pĝ.

[3] *Proverbaro de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof.* Kompilita de Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto; 1980. 70-4 pĝ.

unuaktan teatraĵon *Amo per Proverboj*[1] de la brazila aŭtoro Arthur Azevedo. Ĝia popularеco daŭris unu jarcenton, kaj la plej nova Esperanta traduko aperis en 1981. Por franclingvuloj estas utila *Proverbaro Franca-Esperanta* kompilita de Lucien Bourgois.

Statistikoj elokvente spegulas la popularecon de proverboj inter esperantistoj. Unu fojon jare aperas en la revuo *Esperanto* tabelo montranta la vicordon de la aĉetitaj libroj, kiuj ricevas unu el la 20 pintaj lokoj ĉe la Libroservo de UEA. Kvankam oni kutime diras, ke la Sankta Biblio estas vaste legata libro, tiu titolo aperis en la listo nur ĝis la jaro 1991; poste ĝi vendiĝis malpli. Male, *Proverbaro Esperanta* en ĉiu jaro estis unu el la 20 libroj plej multe aĉetitaj kaj pomalgrande kaj pogrande. Ĉu tio povas signifi, ke nuntempe verdstelanoj ricevas pli da inspiro de sekularaj proverboj ol de la Sanktaj Skriboj?

Ankoraŭ unu donitaĵo indikas, ke scienca esploro pri proverboj estas akceptebla tereno por universitataj studoj. Pli frue en tiu ĉi jaro Pola Radio brodkastis raportaĵon pri pola studentino, Ewa Krach, kiu okupiĝas pri komparado de proverboj en diversaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, por magistriĝa tezo ĉe la Fakultato pri Aplika Lingvistiko de la Universitato de Varsovio[2].

Se fremda la fako, restu ferma la faŭko!

En artikolo, kiu aperis en la revuo *Kontakto,* Anna Brennan (alinome Löwenstein)[3] asertis, ke ĉar Esperanto estas produktaĵo de skriba kulturo, kaj unu homo sola ne povas "verki" proverbon, ne povas ekzisti veraj proverboj en Esperanto. Plue, ŝi opinias, ke inter esperantistoj ne povas estiĝi situacio, kiam estas eble aŭdi kaj diri proverbojn en ĉiutaga uzo de la lingvo. Laŭ Brennan, proverbo estas vorta floro, kiu estas bela sed ne necesa, utila por ilustri tion, kion oni volas diri sed certe ne por transdoni gravajn faktojn. Ankaŭ en la diskuto post mia prelego menciita ĉi-supre, estis esprimitaj skeptikaj argumentoj pri la vera utilo de proverboj, ĉar ne ekzistas situacioj en la moderna vivo, kiuj stimulas homojn al ilia kreado kaj uzado.

Kiu haltas antaŭ ĉiu monto, neniam trafos trans l'horizonto

Negativa sinteno pri originalaj proverboj estis esprimita ankaŭ de antipodulo de Anna Brennan. Antaŭ ol *Nov-Zelanda Esperantisto* ĉesis aperi, mi sendis al la redakcio artikolon titolitan "Kontribuaĵo al la Verda Proverbaro". La tiutempa redaktoro, Jozefo Major, rifuzis publikigi ĝin kaj kategorie asertis, ke "homoj ne povas krei proverbojn nuntempe. Mi malaprobas la

---

[1] Arthur Azevedo. *Amo per Proverboj!* Tradukita el la portugala de A. Couto Fernandes. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais; 1981. 21 pĝ.

[2] "University dissertation on proverbs". *Esperanto sub la Suda Kruco,* English Supplement, pĝ. 2-4, januaro-februaro 1994 (7).

[3] Anna Brennan. "Ĉu veraj proverboj povas ekzisti en Esperanto?" *Kontakto,* 105 (1987/5): pĝ. 6.

tutan ideon ĉar artefaritaj proverboj ne estas proverboj..." En la sekvantaj sekcioj mi montros per citaĵoj el miaj propraj verkoj kaj tiuj de aliaj esperantistoj, ke la malvast-horizonta vidpunkto de la novzelanda eks-redaktoro estas facile refutebla.

Por saĝulo sufiĉas aludo

Lastatempe ricevitaj periodaĵoj enhavas citindajn ekzemplojn de proverboj. Kelkaj el ili estas trafe modifitaj por fariĝi pli konvenaj al la kunteksto.

1. ***Vidi ligneron en okulo aliula, sed en sia propra ne rimarki trabon; vidas pajleron en okulo aliula, sed en sia propra li ne rimarkas trabon.*** (*Boletín* de la Hispana Esperanto - Federacio, 315, 1994, pĝ. 23 kaj 24). Du variaĵoj estas cititaj en la artikolo; ambaŭ diferencas disde la zamenhofa ***en fremda okulo ni vidas ligneron, en nia ni trabon ne vidas.***

2. ***Por ke lingvo estu malfacila, ne sufiĉas nomi ĝin tia*** (*Israela Esperantisto*, 116, 1994, pĝ. 2). Ĝi estas reverkita eldiro laŭ la modelo de la zamenhofa devizo ***por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.***

3. ***Kaj unu hirundo ne sufiĉas por anonci la printempon; du militas, tria profitas!***eblas opinii—sed ***dek kapoj = dek ĉapoj*** (*La Letero de l'Akademio de Esperanto*, 26, 1994, pĝ. 1-3). La zamenhofa versio de la unua estas ***unu hirundo printempon ne alportas.*** La tria havas elementojn de du zamenhofaj proverboj: ***kiom da kapoj, tiom da opinioj*** kaj ***kia la kapo, tia la ĉapo.***

Enigmaj proverboj aŭ proverbaj enigmoj

De tempo al tempo aŭtoroj prezentas enigmon, citante nur parton de konata proverbo kaj donante al legantoj la taskon kompletigi ĝin.

1. ***Kasteloj en aero*** (Cezaro Rosetti). La kompleta proverbo estas ***kastel' en aero—malsato sur tero.***

2. ***El popola la cerbo*** (G. Waringhien). Tie ĉi estas necese aldoni la unuan parton: ***Venas proverbo el popola la cerbo.***

3. ***Hake kaj atake*** (Pierre Janton). La aŭtoro draste stumpigis la originalan proverbon, lasante nur du vortojn en adverba formo. Ili aludas la frazon ***hako post hako estas la plej efika atako.***

Paŝoj al kreado de originalaj proverboj

Per diversaj laŭgradaj paŝoj oni povas iri laŭ la vojo kondukanta al kreado de tute novaj proverbaj esprimoj. La plej simpla rimedo estas ŝanĝi la vortordon aŭ tordi la enhavon de zamenhofa proverbo, kondiĉe ke la rezulto estas senchava: ***belecon taksas ne koro, sed okulo*** (G. Waringhien)—Zamenhof: ***belecon taksas ne okulo, sed koro***; ***kiu tre multe eraris, tiu multon faris*** (M. Miyamoto)—Zamenhof: ***nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faris.***

Pli grandaj ŝanĝoj de signifo rezultas el substituo de vortoj al tiuj troviĝantaj en la originala proverbo. La proverbo ***homo proponas, Dio disponas*** en

Proverbaro Esperanta estis transformita de Azevedo en sia teatraĵo *Amo per Proverboj* en ***homo proponas...kaj virino disponas!*** Zamenhof skribis ***kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas***; ne malpli prava estas mia modifita versio ***kiu frue leviĝas, facile laciĝas***.

Riĉa provizo da novaj proverboj estas havebla per tradukado el lingvoj, kiuj ne estis uzataj de Marko Zamenhof en ties frazeologia kompilaĵo. Ne nur mi malsamopiniis kun Anna Brennan, kiam ŝi asertis, ke "ni ne plu bezonas proverbojn". Tom Fraser, skribante en *Esperanto en Skotlando* por rebati tiun vidpunkton, citas anglalingvan proverbon, kiun li legis sur afiŝo en skotlanda malsanulejo: ***One thought on the kerb is worth ten in the ambulance***. Li esperantigis ĝin per du versioj: ***Pli bonas atento ĉe la voj-rando ol pento en la ambulanco*** kaj ***unu penso ĉe la voj-rando valoras dek en la ambulanco***. La dua versio estas laŭvorta traduko de la angla originalo, sed la unua pli trafe esprimas la ideon kaj, cetere, havas elementon de rimo en la vortoj "atento" kaj "pento". Por tradukado kaj kreado de originalaj proverboj oni provu imiti la formon de la zamenhofaj proverboj, kiuj konsistas el du partoj kaj enhavas diversspecajn rimojn, asonancojn kaj aliteraciojn. Tiel la novaj proverboj estas pli facile memoreblaj, kaj tiuj trajtoj donas al ili la "patinon de jarcentoj", kiel diris Waringhien. En sia romano *Hura!* Julio Baghy skribis ***reĝa sceptro ne direktas, kiam oron ĝi neglektas***. Ĉar mi ĝis nun ne trovis etnolingvan proverbon kun la sama signifo, mi opinias, ke tiu ĉi proverbo estas originala kreaĵo de Baghy.

Mi spertis, ke tre fekunda grundo por disvolvo de originalaj proverboj estas polemikaĵoj. Mi uzas tiujn proverbojn jen kiel titolojn de artikoloj—***erari estas home, obstini estas Diege***—jen kiel motojn aŭ epigrafiojn—***ju pli lerta kaj sperta la cerbo, des pli pafa kaj trafa la proverbo***—jen kiel enkondukajn vortojn de sekcioj de artikoloj—***en argumento, dokumento estas fundamento***. Tre efike funkcias proverboj por riposti*, rebati, kontraŭdiri, alivorte dirite, nuligi la argumentojn de la oponanto. Ekzemple, post kiam mi kritikis eraran lingvouzon en *Internacia Jura Revuo*, la redaktoro, Ivo Lapenna, en akre vortumita letero admonis, ke mi ***ne ŝovu la nazon en fremdan vazon***. Returnpoŝte mi informis lin, ke ***eĉ la diablo kun ĝojplena kri' povas citi el la Sankta Bibli'***. Al alia esperantisto, kiu aŭdacis nomi mian lingvouzon erara, dum en liaj propraj verkoj svarmas misoj kaj mankoj, mi informis, ke ***mefito mokas putoron kaj mem eligas fetoron!***

Io ne estas en ordo malantaŭ la verda pordo

Ne sufiĉe ekspluatita tem-kategorio por kreado de originalaj proverboj estas esperantistoj kaj ilia movado. Jen dudeko, kiujn mi formulis dum la pasintaj jaroj.

1. Inter la eternaj komencantoj regas la unuakursanoj.
2. Li zorgas pri ĝi kiel pri kongres-rezolucio pasintjara.

---

* ["Rebati tuje kaj vigle, ofte sprite" (Suplemento de *PIV*)—Red.]

3. De unu aliĝinto oni du kotizojn ne akiras.
4. La vojo al frenezeco estas pavimita per reformproponoj.
5. Pli facile venos la velka vento ol la verda venko.
6. De Koreio ĝis Ukraini' oni fajfas pri la Akademi'.
7. Estinta esperantisto estas plej danĝera reformisto.
8. Fak-terminaro ne ĉiam estas fakt-terminaro.
9. Li jam posedas Piv-on sed ankoraŭ ne la akuzativon.
10. El etaj denaskuloj kreskas vegetaj ĝisostuloj.
11. Ne venos la fina konkero nur per kanto de "La Espero".
12. Neniu kongreso sen agreso kaj streso.
13. Peĉjo fosas sian sulkon, Steĉjo bakas sian bulkon.
14. Ne ĉiam en la rondo familia regas etoso harmonia.
15. Pli valoras kanti kun Lanti ol vei, nei kaj fine kabei.
16. Eĉ en la mandarena elokvente oratorus Lapenna.
17. Oni ne devas esti freneza por esti esperantisto, sed tio ja helpas.
18. Se suferi vi ne volas pro hont', ne agu kiel Louis de Beaufront.
19. De gluto post gluto subfalas delegito.
20. Estu bona frat' ankaŭ kun anoj de SAT. ❑

ALIĜINTOJ AL LA AEA-KONGRESO 1995

Owen Loneragan
Hua-dong Piao (Harbin)
Merle Packham
Phil Thompson
Marj Ellyard
Frank Swift (NZ)
Peggy Ross
Ray Ross
Gaye Phillips
Merv Schramm
Caroline Turner
Max Wearing
Quan Chun Feng (Shenyang)
Chun-ji Piao (Harbin)
Chun-shan Jin (Harbin)
Chun-hua Jin (Harbin)
Marcel Leereveld
Liu Ying Ai (Shenyang)
Ralph Harry
Jiang Yun Zi (Shenyang)
Quan Ji Feng (Shenyang)
Lin Xiu Ri (Shenyang)
Chen Ju Hai (Shenyang)
Jennifer Bishop
Kay Andersen
Connie White
Ron Gates
Marion Giles
Joff Bell
Annie Spencer
Jay Grant
Kep Enderby
Sandra Connors
Jim Jones
Joyce Turner

KUNSIDO PRI LA VERKADO DE NOVELO

skribas Ron Gates

Troviĝas ĉi-sube la unua alineo de noveleto. Ĉiu partoprenonto de la AEA-Kongreso estas invitata kompletigi la rakonton en ne pli ol 500 vortoj kaj doni al ĝi taŭgan titolon. Mi esperas ke tiuj, kiuj respondos la defion konsentos laŭtlegi siajn verketojn en la kunsido. Sekvos diskutado pri la arto de tia verkado. Tian ĉi procedon oni jam uzis en aŭgusto 1994, okaze de la studsemajn-fino organizita de Esperanto-Fedracio

de Kvinslando ĉe Sunbrila Marbordo. Tiom imponis la tieaj produktoj ke la Federacio eldonis sep el ili en volumeto sub la titolo *La Sekvo de la Testamento.* Ĉu ni povos ĉi-okaze superi tiun poentaron? Bonan verkadon!

Komenciĝas tiele la noveleto

Brenda Dorklin levis sian rigardon for de la matenmanĝa tablo kaj alparolis sian edzon. "Arturo, jen kurioza letero subskribita de iu Filisa Minĉova. Ĉu vi konas ŝin?"

Aldono al la *Librokatalogo de AEA*:

464: *Morto de Sciencisto* de Ronald C. Gates. 81p. $11.50
554: *Apenaŭ Papilioj en Bergen-Belsen* de Trevor Steele 148p. $30.00
465: *Ĉu Vi Aŭdis Ke...?* de Katin Smidelius. Por mezgrada lingvonivelulo. 64p. + kasedo. $35.00
578: *Enlumiĝo* . 44p. $7.80.
507: *Fondita sur Roko* de Albert Goodhier. Filozofio de Spinoza. 37p. $5.60.
538: *Nordmara Duopo* de Albert Goodheir kaj Rejna de Jong. 29p. $5.60.
327: *Merlo sur Menhiro* de Albert Goodheir. Poezio. 94p. $7.80.
060: *La Fremdulo* de Albert Camus. 162p. $14.50.
------ *Malbeno Kara* de Mary Webb. 120 grandformataj paĝoj. $27.50.

[La verko *Por Ĝuste Uzi Esperanton* de Marcel Leereveld. 68 grandformataj paĝoj, haveblas je $25 de Donald Broadribb, redaktoro de *ESK*.]

NOTOJ DE GWENDA SUTTON,

Mi akceptis inviton instrui Esperanton al S-ro Miyoshi Etsuo kaj aliaj en Shirotori, Shikoko Insulo, Japanio. Ralph, mia edzo, akompanos min, sed Lancelot, nia kato, restos hejme kun taŭga zorgantino. Mi atingis Japanion la 29an de marto post tritaga vizito al Singapuro.

Pasintan novembron mi anoncis al membroj de NZEA mian decidon rezigni de la postenoj de ĉefdelegito kaj peranto de UEA la 1an de junio 1995. S-ro David Derwar, Christhurch, fariĝos la ĉefdelegito.

Mi kore dankas S-ron David Ryan, kiu jam transprenis la taskon de peranto. Lia adreso estas: 26A Arun Crescent, Island Bay, Wellington 6002.

La filo de S-ino Jeannie Wilson flugis de Britio por festi la centariĝon de lia patrino kaj trovis ŝin en bona sanstato.

Mia nuna adreso estas: c/o Oomoto Shirotori Bunsho, 403 Matsubara Shirotori-cho, Okawa-gun Kagawa-kin 769-27, Japanio.

ATENTON, NOVZELANDAJ ESPERANTISTOJ

Ĉeĥaj esperantistaj geedzoj intencas vojaĝi tra Nov-Zelando ekde novembro 1995 ĝis januaro 1996. Ĉu estas iu kiu pretas pruntedoni al ili "domon sur radoj" (*campervan*) dum ilia vizitado al Nov-Zelando? Se vi povas helpi bonvolu skribi al: Frantisek Ptacek, Jihlavska 616, 140 00 Praha 4, Ĉeĥa Respubliko.

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
P.O. Box 313, Sunnybank Qld 4109.
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidantoj:
Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.
Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AŬ$30 por individuo, klubo, kc, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn kaj korektojn nepre sendu al la redaktoro.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.
Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669.
Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj fakso: 09-579 4767.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.
Korespondkursoj: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd, Titirangi, Auckland 1007.

Membrokotizoj: NZ$40 por individuo; $50 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano,

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton:
Per pago de 55gld en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto aeal-w, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA, aŭ
Per mendo rekte al la Libroservo de AEA, pagante per 37 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AŬ$44. Sendu al la Libroservo de AEA,
En Usono kaj Kanado abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.

Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estis perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh Classic II kun Sistemo 7.5, uzante Nisus®Writer; kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0. Artikoloj kopiiĝis per OmniPage Professional. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt (Altsys Corp.), kaj Orion Esperanto 16pkt (disponigita de *Eventoj*).

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.